

LA DUA JARCENTO

de Esperanto

❖ ❖ Interkultura revuo ❖ ❖

Speciala numero



Stanislav Schulhof

(1864 - 1919)

PLENA POEMARO

N-ro 1



1999



Jaro 4

Enkonduko

(H. Mayer)

Tiu ĉi speciala numero prezentas la plenan verkaron de Stanislav SCHULHOF (1864 - 1919), kiun promesis la mikroeldonejo Pro Esperanto – ne plu ekzistanta – jam en 1991. Du poemoj de tiu frua originala poeto estas konataj al ĉiuj kleraj Esperanto-parolantoj: *Desperanto* kaj *Kanto de l' sklav*o. Ili estas kvazaŭ kontrapunkto al la multaj naive entuziasmaj laŭdoj, kiuj en la unua periodo prijubilis nian lingvon. Per ili Schulhof iniciatas en la originala literaturo tradici-linion, kiu esprimas pesimisman mondkoncepton kaj kiu kulminas en la Szathmari-a *Vojaĝo al Kazohinio* kaj la Auld-a *Infana raso*.

La verko de Schulhof eble ne estas mezurebla kun la literaturaj produktoj sam-tempaj de eŭropaj etnaj lingvoj. Tamen ĝi estas unu el la malmultaj kontribuoj de la frua periodo, kiuj povas vekti pli ol pure historian intereson ĉe la hodiaŭaj Esperanto-parolantoj. Laŭteme la Schulhof-aj poemoj pendolas ĝuste inter naiva jubilo pri-Esperanta kaj "despero". Li klare vidis la duoblan utopion: La homoj ne akceptos Esperanton, kaj eĉ se ili akceptus, la homa naturo restus barbara:

*[...] tiam ree homon batos homo,
sed li batos lin en via nomo -
ankaŭ kun la stelo sur standardo.*

("Desperanto")

Poezia Printempo 1912

Schulhof aperigis siajn poemojn en tempo tre decida por la evoluo de la originala poezio: Ĉirkaŭ la jaro 1912 aro da junaj poetoj elpaŝis al la publiko. Naskiĝinte post 1887 – do evidente Schulhof apartenas al generacio pli frua, tamen la tempa koincido de publikado estas eble pli ol hazardo – kaj lerninte la lingvon ĉirkaŭ 1900, la nova generacio inter 1910 kaj 1917 publikigis en etaj broŝuroj poemojn, kiuj estis tute novaj en sia tono. Ne plu ian finvenkon ili prijubilis, sed ili esprimis subjektive individuan mondpercepton. El tio fontas simileco ne nur de la stilo, sed ankaŭ de la temoj kaj literaturaj kliŝoj.

La literatura teoriisto de tiu generacio estis Edmond Privat, kiu en sia parolado "Pri Esperanta Literaturo" dum la 7-a UK 1911 (publikigita 1912) skizis la rolon de la juna literaturo en la juna lingvo.

Kronologio de la Poezia Printempo 1912

Por doni superrigardon, jen la listigo de la verkoj laŭ aperjaroj. Kvar poetoj estas certgrade esceptoj: tri pro la fakto, ke ili apartenas al pli maljuna generacio (pri Schulhof ni tion jam konstatis; plie la maltalento Hankel, *1844; Frenkel, *?). La kvara, Mirski, *?, elkadriĝas pro la elekto de satira ĝenro.

1908 Frenkel "Verdaj fajreroj"

1910 Braun, Karolczyk "Unuaj agordoj:

1911 Hankel "Sableroj"

Privat parolas ĉe la 7-a UK "Pri Esperanta Literaturo"

Schulhof "Per espero al despero", "Kion la vivo alportis"

1912 Deŝkin "Versaĵoj"

Koslowski "Petaloj"

Levenzon elpaŝas literature per poemoj en diversaj gazetoj, verkis versajne nur ĝis 1916, nur 1986 aperis lia plena verkaro: "La kapo de l' Gorgono", kiu entenas poemojn kaj tri versajn dramojn.

Privat "Pri Esperanta Literaturo", "Tra l' silento" (poemaro)

Schulhof "Aŭtunaj floroj"

1913 Privat "Ĝinerva" (versdramo)

1914 Kriss "Melodioj de l' nokto"

1917 Mirski (pseŭdonomo: *Bela Manto*) "Dorna karesilo" (satiraj fabloj)

Perdita originala epopeo

Grandaj epopeoj ne ekzistis en la originala literaturo ĝis 1993, kiam Abel Montagut aperigis sian "Poemon de Utnoa". Ŝajnas, anakronismo verki epopeojn en la 90-aj jaroj, tamen Montagut ligas tre aktualan temon al antikva formo: Post la okazo de la hororaĵoj en nia jarcento – neniam antaŭe tiom da homoj mortis en militoj aŭ en popolmurdaj ekstermadoj – ĉu eblas ankoraŭ optimismo koncerne al la evoluo de la homaro?

Estis ĝis nun nekonate: Jam Schulhof komencis verki skizon de granda epopeo. Spuroj troviĝas en **La Progreso**, ĉeĥoslovaka organo esperantista, aperinta en Plzeň, el la jaro 1920. Estas entute du fragmentoj, prenitaj el la postlasaĵo:

Fragmento 1, 1920/7, p. 55-56. La titolo "Ĉu?" estas aldono de la redakcio. En ĝi la aŭtoro elvokas la famon de la Homera

epopeo Iliado, kiu pro sia grandiozeco eternigis la historion ĉirkaŭ la urbo de Trojo – Schulhof nomas ĝin Troas, kiu origine signifas lando ĉirkaŭ Trojo, vidu la vorton Troado en PIV – en la dua jarmilo antaŭ nia erao. La poeto starigas la demandon, kiu estos la poeto prikantanta nian epokon multe pli grandan kaj prikantindan pro siaj atingoj ol antaŭaj epokoj. La 42 versoj de tiu fragmento 1 estas kvazaŭ preludo al la verkota epopeo, la programo kaj pravigo.

Fragmento 2, 1920/10, p.81-82. La demando signas kiel titolo estas ankaŭ ĉi-foje aldono flanke de la redakcio. Tiu fragmento tutverŝajne estas la komenco de la epopeo. Temo: la grandaj atingoj de la homaro, la nesondebla futuro, la lingvo elektenda por tuthomara epopeo, kiu por nia poeto estas Esperanto.

Schulhof tre klare sentis identecan konflikton: Li vivis en tempo, kiam naciismo pli kaj pli firmiĝis kiel ĝenerale akceptata principo. Hodiaŭ ni emas taksi naciismon – speciale post la sperto de hitlerismo – kiel ion negativan. Tamen ni ne forgesu, ke por multaj lingvoj nacia konsciiĝo estis la bazo por pluivado en rezisto kontraŭ pli grandaj lingvoj. Tiel estis en la Aŭstria-Hungaria Monarkio por la slavaj lingvoj, kiuj estis daŭre minacataj per la asimila premo flanke de la hungara kaj la germana. Schulhof amis sian hejman lingvon – la ĉeĥan – kaj estis por li malfacile ligi tiun nacian senton kun tiu tutmondeco, kia ĝi estis prezentita pere de la Zamenhofa lingvo. Li esprimas tiun konflikton en la poemo *Ho ve, koro disŝirita* (en "Per espero al despero"):

*Ho ve, koro disŝirita!
Duon' batas por la mondo,
tuta mondo kaj senlima,
duon' por la propra rondo
malplej granda, plej proksima.
Kia doloro
mia koro.*

En la epopea fragmento tiu konflikto, tiu hezito ŝajnas definitive superita: la atingoj de la nuntempoj ne apartenas nur al unu nacio, ili apartenas al la tuta homaro. Kaj se li volas prikanti tiujn atingojn, tiu tutmondeco havu konsekvencojn en la lingvo: La nova poezia lingvo estu Esperanto.

Al la 3000-jara tradicio de epopeoj en la Eŭropa literaturo la fragmentojn ligas ne nur la verso, t.e. la heksametro, sed ankaŭ aliaj elementoj, ekz. la alvoko de la Muzoj – ekde Homero firma toposo* ne nur de la greka epopeo (verso 26: *Se mi forton havus, kaj rilatojn kun la Muzoj* [tiel!])...

La unuaj versoj de tiu **fragmento 2** atestas la klasikajn sciojn de Schulhof. Ĉu estas hazardo, ke ili memorigas nin pri versoj de Sofoklo:

H o r o

*Multon trafas mia mir'
en ĉi monda domo;
Sed plej inda je admir'
Estas Li, la Homo!*

[...]

*Li lernis la parolon, la penson ventrapidan,
Kaj kiel civitano obei al la leĝo,
Kaj subtegmente spiti al pluvo kaj al neĝo:
Por ĉio li eltrovis rimedon la validan.*

*Nenion okazontan li frontas senrimede,
Krom morto; ĉar de tio ne estas ja evito.
Kaj tamen li eltrovis, per sia cerbmedito,
Metodon la malsanojn kuraci milprocede.*

[...]

(El: **Antigona** de Sofoklo, citita laŭ Reĝo Epido kaj Antigona. Enkonduko, elgrekigo kaj notoj de Douglas B. Gregor, La Laguna, 1960).

*toposo – en literaturo: kliŝo

Fragmento 1

ĈU?*)

01 Vi, epok' plej granda en la historio,
02 vi, epok' dum kiu pli da larmoj rulis,
03 pli da sango fluis ol dum mil da jaroj
04 longe forpasintaj, krudaj kaj senbridaj,
05 vi, epoko sola en la viv' homara,
06 ĉu vi foje trovos kanton je vi indan
07 kaj poeton al vi adekvatan,
08 kiel foje trovis la falinta Troas,
09 ĝiaj filoj fortaj, ĝiaj malamikoj,
10 kiuj kvazaŭ granda aro da lokustoj
11 el parencaj landoj, sur alia bordo,
12 venis venĝi la honoron de la reĝo.

13 Ho, feliĉa Troas, sur ruinoj viaj,
14 sur kolonoj, kaj sur muroj disrompitaj,
15 kiuj kiel atestantoj de teruraj agoj
16 superstaris en aero suda milda
17 kaj en noktoj plenaj de odor' kaj steloj.
18 poezi'**) disverŝis sian riĉan kornon,
19 kaj sur ĉiu floro, kaj sur ĉiu ŝtono
20 brilis poste al la posteuloj
21 multekostaj ŝtonoj, fajr' kaj stelsimilaj.

22 Lerta man' de homo al ni nekonata,
23 en jarcentoj postaj tiujn dismetitajn
24 erojn zorge levis, kaj kolektis foje,
25 kaj ĝis nunaj tempoj la okazintaĵoj
26 de la longe forpasinta granda tempo
27 ekparolas al ni, al ni ekaperas
28 per la vort' de kantoj nobla lliado,
29 kaj kun nom' de Homer' blinda
poetestro.

30 Ĉu, epoko nova, kiu laŭ distancoj
31 kaj laŭ nombro de la homoj kaj objektoj
32 estas kun la pasinteco sen komparo,
33 ĉu sur agoj viaj, urboj disrompitaj,
34 ĉu sur kampoj fekundegiĝintaj
35 per la sango homa kaj per larmoj varmaj,
36 ĉu sur vi, simile al la estonteco

37 poezio sternos siajn flugilegojn,
38 kaj ĉu ek troviĝos foje hom' aŭ homoj,
39 kiuj laŭ ekzemplo de la antikveco
40 en bukedon unu ligos ĉiujn florojn,
41 kaj per ŝtonoj brilaj, kiuj kristaliĝos
42 el la vundoj sangaj, ĝin ornamos lerte?

*) Tiu ĉi poemo, sen titolo, estis trovita en la postlasaĵo de Dro. St. Schulhof kaj kun afabla permeso de Sino. Schulhofová ĝi estis al ni sendita pere de so. dir. Poppe en Pardubice por ĝin enpresi. Ĝi montras sendube, kia majstro estis la mortinta poeto kaj kiun perdon ni suferis pro lia foriro. - Samtempe oni sendis al ni alian versaĵon de la mortinto, kiu meritas specialan preparolon. Ni ĝin enpresos en la venonta numero. [Noto en "La Progreso"]

**) Linio 18: en la originalo: poesi'

Fragmento 2

Kun permeso de sino. Schulhofova pruntis al ni so. red. Weiner el Praha la notlibron de la mortinta poeto dr. Schulhof. Tie ni trovis skizojn por granda epopeo, sen titolo, kiun la mortinto preparis. Nun, kun ekmiro ni ricevis de so. dir. Poppe el Pardubice kelkajn foliojn kun versaĵoj, kiuj evidente estas enkonduko al epopeo. Bedaŭrinde ĉio alia mankas. [Noto en "La Progreso"]

?

01 Strangajn fortojn ekposedas jam
homaro,
02 sen distancoj estas jam planedo nia,
03 tempojn, rokojn trapenetas homa vido,
04 ekatakas kosmon, sen la fin' kaj limoj,
05 la trezoroj de la ter' kaj vastaj maroj
06 malfermiĝos al homaro avidega;
07 unu restas nur kaj sola sekretaĵo -
08 estonteco, kiun trapenetri vane
09 la homaro ofte ekklopodis.

10 Ĉu ni povos scii kio post la tempo
11 plena je doloroj kaj je konvulsioj
12 sekvos, kien ondoj ĵetas nian ŝipon?

13 Ĉu el sang' kaj varmaj larmoj disverŝitaj
14 nova tag' ekbrilos, aŭ ĉu nokt' terura
15 etendiĝos sur la kampoj, urboj, homoj
16 senegala en la homa historio?

17 Pli ol nokt' malluma estas estonteco;
18 ni ne povas scii, kion tag' venonta
19 al ni donos, kion al ni ruze prenos,
20 kaj neeble scii, ĉu okazintaĵoj,
21 kiuj senegalaj estas, senekzem-
plaj*),

22 trovos foje iun, kiu ilin vestos
23 per vort' poezia, simile al tiu
24 kiu Troas urbon, la miniaturon
25 glorifikis por eternaj postaj tempoj.

26 Se mi forton havus, kaj rilatojn kun la
Musoj [!],
27 necesegajn por la task' simile granda,
28 ho, mi volus sur min preni tiun ŝarĝon,
29 kaj konservi por venontaj posteuloj
30 ĉion kio en la tagoj nunaj, plej pasiaj
31 ŝprucas el la koro de l' homaro,
32 ĉiujn agojn grandajn, preskaŭ super-
homajn,

33 sed eĉ zorgojn niajn, nekaŝante
ombrojn.

34 Sed se mi eĉ havus tiujn grandajn
fortojn,

35 se mi estus amatulo de la Musoj,
36 ĉu mi havus lingvon, lingvon vorto-
riĉan

37 kompreneblan al la homoj senescepte,
38 kiu apartenas al la mondo tuta,
39 tute same kiel nunaj grandaj tempoj
40 apartenas poste ne al rasoj, gentoj,
41 sed al mondo tuta, simple: al homaro.
42 Vane estus uzi mian lingvon patran,
43 lingvon kiu sonis ĉe lulilo mia –

44 en patruj' bohema oni min komprenus,
45 sed la verkoj, kiuj foje apartenos
46 al homaro, devas esti prikantitaj
47 per la lingvo, kiu sen la landaj limoj
48 sonos foje ĉie sur la tuta globo.
49 Ĉu ĝi estas eble nobla lingvo franca,

50 ĉu ĝi estas eble lingvo de Ŝekspiro
51 aŭ ĉu ĝi de Kant, aŭ Dante, aŭ de Tolstoj,
52 ĉu ĝi eble estas la belega lingvo
53 de antikvaj Grekoj, aŭ de Rom' potenca?

54 Vane mi vin uzus, ĉar vin nur komprenus
55 homoj, eble milionoj, sed mi volus
56 kanti al homaro, ne al multaj homoj,
57 ĉar nur la homaro foje ekkomprenos
58 la suferojn kaj dolorojn de nuneco.
59 Ĉu vi lingvo mia, mia Esperanto
60 povus al mi prunti sufiĉe da vortoj
61 por esprimi ĝin, per kio nun ekstrema
62 ĉiuj fibroj niaj, landoj kaj aero,
63 ĉion kio en terura uragano
64 en konfuz' disfalos, renaskiĝas?

65 Grandan pezan șarğon sur min nun
prenante.

66 mi ne preĝos al vi, Musoj, Olympanoj
[sic/tiel!],

67 sed humile mi sur teron falos
68 kaj al vi mi preĝos, Majstro, vi amata,
69 al vi Majstro, kiu en moment' ĉi tiu
70 al mi ekaperas.

71 Trajtojn viajn mildajn
72 mi rekonas, kaj mi aŭdas voĉon vian.

73 kiu sonas tiel dolĉe kiel sonis
74 foje voĉ' de tiu, kiu mondon savis.

75 Al vi mi nun preĝas, benon vian petas
76 por la venko granda, kiun entrepreni
77 mi kuraĝas. Ĉu vi helpon ne rifuzos?

78 Ĉu vi ankaŭ donos al mi la permeson
79 ke en la ĥaoso de l' okazintaĵoj
80 vin mi ankaŭ nomu[,] tuŝu vian gloron?
81 Mond' ne komprenebla estus sen Jezuo,
82 kaj ne komprenebla estus la eposo,
83 temp' en kiu estas ankaŭ Vi la rado...

*El postlasaño de Dr. Stanislav Schulhof
(+ 1919)*

*) Linio 21: en la originalo: senegzemplaj

*La versoj 70 kaj 71 estas unu sola verso,
verŝajne nur dum kompostado erare disigita.*

La metriko

(Klarigo: X estas simbolo de akcentita silabo, – de neakcentita silabo)

La du fragmentoj estas verkitaj en speco de heksametro, ekde Homero la versoj de la epopeoj. La historio de la heksametro en la Eŭropa literaturo estas speciala ĉapitro, kiun ni ne povas trakti ĉi tie. Ni nur memoru, ke la adapto de la antikvaj metroj estis speciala defio por la "modernaj", t.e. la postgrekaj kaj postlatinaj literaturoj Eŭropaj. Ekzemple la germana heksametro naskiĝis post plurjarcenta klopodo nur per la tradukoj de Johann Heinrich VOSS (1751 – 1826).

En Esperanto la unua heksametristo estis Abraham KOFMAN per sia fragmenta traduko de la Iliado (Nürnberg, 1895). La rezulto estas respektinda, se oni konsideras, ke Esperanto tiam havis nur ok jarojn kaj preskaŭ ne ofertis versteknikajn spertojn. Tamen ĝi povis esti nur unua provo, en kelkaj punktoj malperfekta. Ĉe Kofman la heksametro konsistas el ses piedoj daktilaj (X – –), kiu povas alternativigi – krom la antaŭlasta piedo – kun trokeoj (X –). La lasta piedo ĉiam estas trokea.

Jen la unua verso de la Kofmana traduko:

Kantu, di/ino, ko/leron de / la Pele/ido A/ĥilo
X – – / X – – / X – – / X – – / X – – / X –

Ĝenerala problemo de la modernigo de la heksametro estas la jena: La antikvaj metroj estis konstruitaj – pro la lingvaj donitaĵoj en la greka kaj la latina – surbaze de la sinvicigo de longaj kaj mallongaj silaboj, dum en la modernaj Eŭropaj literaturoj estas du fundamentoj por konstrui metron: la akcentiĝo (ekz. la ĝermanaj lingvoj) kaj la silabnombrado (la latinidaj lingvoj). Esperanto – kun sia klara akcenta sistemo – do elektis la unuan sistemon, kiu tamen prezentas por la heksametro specialan danĝeron: tre facile ĝi enfalas en specon de martelado, kiu ekĝenas dum legado, ja epopeoj estas ĝenerale longaj verkoj.

Ion alian al ni montras la citita verso: Oni devas postuli la eblon meti kromakcenton sur silabo troviĝanta inter du neakcentitaj silaboj aŭ ĉe la komenco de la verso antaŭ neakcentaĵo. Nur tiel saviĝas la heksametro, en nia verso ekzemple per la tute nenatura akcento de la artikolo "la". Tio ne kontentigas.

La heksametro de Schulhof ekzistas nur el trokeoj, ĝi estas do eĉ malpli varia ol tiu de Kofman, pli rigida kaj eĉ pli "martelus", se ni posedus la tutan epopeon. En la du mallongaj fragmentoj do tiu fenomeno ne ĝenas. Eble Schulhof evoluintus alian version, se la destino donintus al li pli da tempo.

Estas tre interese konstati, ke Abel MONTAGUT en sia "Poemo de Utnoa" kunigis akcentadon kaj silabnombradon al tute nova metriko Esperanta kaj per tio solvis la problemon de originala verso epopea. Klarigojn pri tio vi trovas en "Esperanto/Lesebuch" de H. Mayer, p. 178 - 180 (Pro Esperanto, 1995).

Biografiaj informoj

Malmultas la aŭtentaj informoj pri la vivo de Schulhof. Kiel ofte ankaŭ en la kazo de Schulhof nekrologo estas la ununura fonto por biografiaj informoj. Tial prezentiĝas sur la sekva paĝo la tri tekstoj, kiuj aperis je la okazo de lia morto en *La Progreso. Ĉeĥoslovaka Organo Esperantista*, 1919, n-roj 8 – 9, t.e. nekrologo, informo pri la funebra ceremonio kaj akrostiĥo, kiu formas per la komencaj literoj de la versoj la vortojn *Dro Stanislav Schulhof*.

MUDr. STANISLAV SCHULHOF,

prezidanto de Esperantista Klubo en Pardubice.

La 18an de aŭgusto t.j. mortis en Praha je meningito nia fama poeto kaj verkisto MUDr. Stan. Schulhof, prezidanto de Esperantista Klubo en Pardubice. Li naskiĝis en la jaro 1864 en Lipka apud Trhová Kamenice, studis gimnazion en Rychnov nad Kněžnou kaj universitaton en Praha. Sinsekve li estis kuracisto en Dobruška, Červený Kostelec kaj laste dentisto en Pardubice.

La mortinto estis unu el la ĉefaj Ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Per sia poemaro "Bohemaj grenatoj", kie li eminente estas tradukinta antologion el plej bonaj ĉeĥaj verkistoj, li montras al fremdlando esperantista, ke la ĉeĥaj literaturaj "grenatoj" valoras esti enmetitaj en la kronon de la monda literaturo. Liaj originalaj esper. poemaroj: "Per Espero al Despero" 1911, "Kion la Vivo alportis" 1911, kaj "Aŭtunaj Floroj" 1912 troviĝas en la biblioteko de preskaŭ ĉiu fremdlanda esperantisto. Sennombraj estas liaj propagandaj artikoloj en la ĉeĥaj kaj eksterlandaj ĵurnaloj kaj tre multaj liaj kursoj.

La esperantista movado ĉeĥa perdas en li honestan pioniron kaj la eksterlandaj samideanoj sinceran amikon, kies nomo kaj laboro restos por ĉiam kunigita kun historio de Esperanto.

Ant. Pitlík
del. de UEA en Praha.

Al la morto de Dro Schulhof, kiu tiel antaŭtempe kaj ne atendite forlasis niajn vicojn, ni sciigas la jenon: La funebraj ceremonioj okazis la 20. de aŭg. en Praha en Patologia instituto, kie nia neforgesebla amiko kaj kolego mortis. En ĉeesto de delegitoj de Prahanaĵ kluboj: Esp. klubo, Fraŭlina rondeto kaj Verda stelo kaj de la Esp. klubo en Pardubice adiaŭis la mortinton s-o Aug. Pitlík per sia funebra parolo. La kadavro de Dro. Schulhof estis poste transportita al Liberec por kremacio. Dumvoje la vagono haltis en Pardubice kaj ĉi tie okazis la 21. aŭg. posttagmeze funebra ceremonio antaŭ la ĉerko, kiu restis en ornamita vagono. Krom la familio de la mortinto ĉeestis granda aro de liaj personaj amikoj kaj konatoj. La esperantistaro partoprenis plej parte. La soleno komencis per kanto de kantista ĥoro, post kiu sekvis kelkaj paroloj de amikoj kaj klubrepresentantoj. Inter ili parolis esperante s-o. direktoro Poppe, kiu en la nomo de Esp. klubo de Pardubice adiaŭis la altŝatatan samideanon. La imponanta ceremonio finiĝis pre kantado de ĉeĥa nacia himno *Kde domov můj?*. – Pri la morto de Dro. Schulhof raportis ĉiuj ĉefaj bohemaj tagĵurnaloj.

Subleŭtenanto Miloš Lukáš:

Mortis nia poeto...

D e la altaĵo Parnasa depaŝu, ho Muzoj, malsupren,
R ozojn elplektu el haroj kaj ilin en maron forĵetu,
O rajn demetu ornamojn, kaj plendu kaj ploru maldolĉe!

S ciu, ke krevis la kordoj sur liro de nobla poeto,
T iom de vi favorita kaj tiom de ni adorata;
A ŭdu, Parnasaj diinoj, la vorton teruran li mortis! –
N e plu eksonos la liro, ne plu la amata kantisto
I nter diversaj popoloj aŭdigos en rimoj sonoraj
S iajn dezirojn kaj revojn; li mortis, li ĉesis prediki
L a plej majestatan ideon pri paco, konkordo kaj amo
A l la tutmonda homaro, kaj pri reciproka fratiĝo;
V ane sopiros ni ĉiuj – li mortis, li ne plu revenos...

S ed la fervora laboro, al kiu li vivon dediĉis,
C erte ne restos sen fruktoj. Ni ĵuras, ke ni ĝin daŭrigos.
H ereditaĵo ĝi estas, kaj ni ĝin ne lasos pereii.
U nu nur celon ni konos: konduki sub verdan standardon
L a dividitajn naciojn kaj ilin instrui pri amo. –
H o, vi mortinta kantisto, per via subita foriro
O rfojn ni ĉiuj fariĝis; sed ĉiam el viaj poemoj
F orton ni ĉerpos, kuraĝon – kaj kredon, ke fine ni venkos!

1910 28./VIII. - 12./XI.

PER ESPERO AL DESPERO

DEK POEMOJ DE DRO STANISLAV SCHULHOF.

AL MEMORO DE SIAJ GEPATROJ DEDIĈAS TIUJN ĈI POEMOJN
AŬTORO.

ANTAŬPAROLO.

Transdonante miajn provaĵojn al nia vasta publiko, mi esprimas sole tiun peton, ke niaj estimataj gazetoj, kiuj pri ili atentis kaj per sia recenzo ilin honorigos, bonvolu sendi al mi la koncernan ekzempleron kaj same mi petas niajn samideanojn kaj korporaciojn, kiuj uzos tiun aŭ alian poemon en siaj kunvenoj aŭ ĉe aliaj okazoj, ke ili informu min pri tio.

Tion petante, mi sekvas sole tiun celon, ke mi povu en miaj estontaj verkoj eviti la erarojn al mi citotajn kaj poste, ke mi eksciuj, ĉu miaj kantoj elŝprucintaj el profundo de mia koro trovis komprenon ankaŭ en la koroj de miaj kunsentantoj sur la tuta terglobo. Ĝojo, ke mi faris laboron utilan kaj bonan, estus certe por mi la plej granda kaj ankaŭ la sola rekompenco.

Fine mi kore dankas al s-o K. Kudrna, mia instruisto de Esperanto en Chrudim, kaj al s-o red. Ed. Kühnl el Praha por iliaj amikaj konsiloj gramatikaj kaj stilistikaj.

En Pardubice (Bohemujo).
je fino de la jaro 1910.

Dro Stanislav Schulhof.

VERDA STELO.

*Ĉi tiun mian unuan poemon mi dediĉas
al Majstro Dro L. L. ZAMENHOF,
kiel pruvon de mia admiro kaj dankemo.*

Bruas vento furioza,
konvulsias ŝip' kaj velo.
Granda maro ondliĝi[n]ta
kun la nokto kunmiksita
- malproksima nia celo.

Tremas, krakas nia ŝipo,
masto ĝemas en la vento.
Sang' en korpo malvarmiĝas,

vort' en buŝo silentiĝas,
koron premas antaŭsento.

Ĉie ĝemo, plendo, timo.
Nur la homo sur la ponto
firme, kiel ensorĉite,
tondron, pluvon, ĉion spite
vagas en la horizonto.

Vagas en la horizonto,
sed ne trovas sian celon.
En ribel' de l'elemento,
en la pereiga vento
perdis sian verdan stelon.

Ĉu vi konas verdan stelon.
tiun stelon de l'idaro?
Naskis ĝin la oriento,
ekbrilis en okcidento,
en Bulonjo sur la maro.

Kia estas verda stelo?
Malgrandeta kiel lento,
sed se lumo ĝia brilas,
tuj glacioj malaperas
kaj varmiĝas kontinento.

Nur kriegu, brua maro,
vana via granda forto!
En malgranda luma lento,
kiun naskis l'oriento,
bazas nia kor' kaj sorto.

Verda stelo, - mova forto,
ho, aperu en la nubo!
Lumu en la krizmomento,
masto ĝemas en la vento,
malfermiĝas nigra subo.

28./VIII.

φ

HO VE, KORO DIŜŜIRITA.

Al mia karega familio.

Ho ve, koro diŝŝirita!
Duon' batas por la mondo,
tuta mondo kaj senlima,
duon' por la propra rondo
malplej granda, plej proksima.
Kia doloro
mia koro!

Ho ve, koro diŝŝirita!
Duon' batas por idaro,
mia propra sang' kaj varmo,
duon' batas por homaro
kaj senĉesa ĝia larmo.
Kia doloro
mia koro!

Ho ve, koro diŝŝirita!
Duon' batas por fragmento,
propra lingvo, propra domo,
sed duon' por ĉiu gento,
de Tokio, ĝis al Romo.
Kia doloro
mia koro!

29./VIII.

φ

EN LA MONDON VENIS NOVA SENTO.

Al sinjoro KABE.

Kia stranga, forta voko
sonas en aero hela?
Suno brilas sur lazuro,
jam disfalas putra muro,
ridas tago la plej bela.
Ho, leviĝu mia gento,
blovas juna, freŝa vento -
en la mondon venis nova sento.

Jam leviĝu miaj fratoj,
for de via ŝima ĉambro!
Pala estas via sango,
lacigita via vango,
refreŝiĝu en la ambro.
Sen kolero, sen turmento
blovas juna, freŝa vento -
en la mondon venis nova sento.

Malsaĝul' nur sidas hejme,
hom' al kiu mankas koro.
Nur por homo sen konfido,
ĉagreniga invalido
ne ekzistas sun' kaj floro.
Por mi sola argumento:
Blovas juna, freŝa vento,
en la mondon venis nova sento.

Ĝuu vivon, amon, sunon
ĉiuj gentoj, ĉiu raso!

Jam aperas kun freŝeco
 radiantanta estonteco,
 ĉarma, sen la embaraso.
 Ho, ne dormu mia gento,
 blovas juna, freŝa vento -
 en la mondon venis nova sento.

15./IX.

φ

LULKANTO.

Al tre estimata sinjorino MARIO HANKEL.

Dormu, mia infaneto,
 en lulilo, sen ornamo.
 Estas jam silenta tero,
 dolĉe dormu sen sufero,
 mia koro, mia amo.

Dormu, mia infaneto,
 sonĝu pri la gardaĝelo,
 pri la birdo flugetanta,
 pri la suno radiantanta
 kaj pri steloj sur ĉielo.

Ankaŭ via patrineto
 revis iam pri la rozo,
 pri la floroj kunodoro,
 pri la amo sen doloro,
 pri la vivo sen la prozo.

Estis iam infaneto,
 kiu kuŝis en atlaso,
 kiu sonĝis pri la riĉo,
 pri la amo kaj feliĉo,
 pri la kisoj en amaso.

Dormu, mia infaneto,
 sonĝu nur pri estonteco.
 Baldaŭ malaperos lumo
 kaj la tago kun parfumo
 flugos for kun rapideco.

17./IX.

LONGE DORMIS.

Al sinjoro Dro J. FOUSEK.

Longe dormis mia kanto
 fermita en mia koro,
 ripozante kiel floro,
 kiel semo en la tero,
 sen sufero, sen espero.

Longe dormis, ho ke dormu
 mia kanto en la koro.
 sen espero, sen doloro,
 sen konscio kaj sen voĉo,
 sen aplaŭdo, sen riproĉo.

Poezio - granda dono,
 kiel amo en la koro!
 Sed nur amo sen doloro
 en la koro nekontuza,
 en animo nekonfuza.

Poezio - dia dono -
 granda estas via ĉarmo,
 sed maldolĉ' kiel larmo,
 dum la amo sen konfido,
 dum disiĝo sen revido.

24./IX.

φ

NUR ANTAŬEN!

Al nia ESPERANTA KLUBO en Pardubice.

Nur antaŭen, nur antaŭen
 tra la maroj, tra la lando.
 Malgraŭ ĉio, forto, aĝo,
 rido kaj la mokataĵo,
 iru nia propagando.

Jam prosperos nia stato,
 vivos, kreskos, floros ĉio,
 se en bona harmonio
 apud frato marŝos frato.

Nur antaŭen, nur antaŭen
tra la nokto, trans la baro,
en la urbon kaj vilaĝon
ni kolportu la novaĵon,
kiun ĝuos la idaro.

Baldaŭ, baldaŭ la standardo
flirtos gaje en la nubo,
se kuraĝe kaj sen dubo
marŝos nia avangardo.

Nur antaŭen, nur antaŭen,
niaj bravaj pioniroj,
ankaŭ se en batalado
multa nia kamarado
nin forlasos sen sopiroj.

For prokrasto efemera!
Nur perfida renegato,
reformema apostato,
ĉiam ĝemas senespera.

Nur antaŭen, nur antaŭen
kun konfida, gaja kanto;
jam finiĝas pantomimo,
malaperas jam la ŝimo
per la tuŝ' de Esperanto.

Kun Espero en la koro
kun la stelo sur standardo,
marŝu nia avangardo
nur antaŭen por la gloro!

6./X.

φ

LA REVIVIĜO.

Mi jam estis sen la idealoj,
ne ekzistis por mi jam la floro,
eksekiĝis amo en la koro,
min ne tuŝis kant' de najtingaloj.

Mi nur vidis rapidantan sorton,
nokton sen eliro kaj sen fino,
la fantomon, kun la kurba spino -
insideme proksimantan morton.

Mi ne ploris, mi ne ĝojis plue,
mi nur kantis unu melodion,
ke la sorto tiun komedion
kun mi finu, kiel eble frue.

Sed subite, kiel el la dormo
mi vekigis tute elŝanĝita
kaj la mondo de mi forlasita
aperis al mi en nova formo!

Granda suno brilis sur lazuro
kaj vastiĝis ĉie lum' kaj varmo
kaj en branĉoj kant' de l' birda svarmo
sonis kiel ia uverturo.

Tuj mi sentis, kiel stranga flamo
disversiĝas en la pala vango
kaj en mia koro densa sango
brulis kiel iam dum la amo.

Odorplena spiris la aero
kaj el ĉiu plej kaŝita niĉo
ekridetis al mi la feliĉo,
nova vivo, plena je espero.

Dankon al vi, stranga verda stelo,
kiu en la nokto sen espero
el putranta, ŝima atmosfero
ekaperis hele sur ĉielo.

Dankon al vi, kiu en krepusko
ekbriletis al mi, foriranto,
kiel precioza diamanto,
kiel luma muŝo en la musko.

Nur mi tremas, ke la juna floro
ne sekiĝu al mi en la mano
kaj ne dronu en la oceano
mia stelo, kiel meteoro.

10./X.

φ

RESPONDO.

Vi deziras, sinjorino mia,
scii ion tute sen vualo
pri la vivo en rondeto nia,
ĝiaj membroj kaj pri nia lando,
pri la esperanta propagando
kaj pri nia kor' kaj idealo.

Jen respondo al via demando.
Kvankam nin dividas vasta maro,
kvankam malproksima nia lando,
tamen samaj estas niaj koroj,
tute samaj ankaŭ la doloroj
kaj por niaj celoj sama baro.

Tute samaj estas niaj homoj
kaj ni havas tute saman vidon.
Diferencas eble niaj domoj,
eble uzas ankaŭ fremdan formon
la patrino, se ŝi en la dormon
lulas sian malgrandetan idon.

Eble fremda estas nia vesto,
niaj veturiloj galopantaj,
sed mi pensas, ke ni en la resto,
kvankam strangaj estas niaj nomoj,
tamen estas tute samaj homoj,
ĉiam trompitaj kaj esperantaj.

Kaj mi pensas ankaŭ, ke egale
kiel ĉe vi envi' ĉion pestas,
homon homo batas neniale;
nur en nia esperanta svarmo
nin kunigas speciala varmo
- ĉar ni ĝis nun tre malmultaj estas.

15./X.

φ

DESPERANTO.

Dolĉe sonas via nova nomo,
ho Espero, nia bela vorto!
En la nokto plena je sopiro

Vi, Espero, estas eliksiro,
sed nur eliksiro sen la forto.

Kontraŭ ĉio estas vi rimedo,
kiel kontraŭ superakvo muro,
sed vi estas sabla bariero,
ĉiam disfalanta en aero,
sed ni kredas je vi sen murmuro.

Tre agrabla vere estas sonĝo,
ankaŭ sonĝo pri la estonteco,
pri senĉesa homa harmonio,
unu amo, unu familio,
- sukeraĵo por la infaneco.

Ni atendas vane tempon belan,
kiam regos sole via nomo.
En eterna monda karuselo
vi Espero restos ĉiam stelo,
ĉiam malproksima por la homo.

Eĉ se iam jena tempo venos
post jarmiloj, kaj post miliardo,
tiam ree homon batos homo,
sed li batos lin en via nomo -
ankaŭ kun la stelo sur standardo.

18./X.

φ

ĈE LA FORNO.

Al sinjoro ED. KÜHNEL.

Nun mi ree sidas en la niĉo,
ree hejme ĉe la propra forno,
post ekskurso en la vastan mondon,
mi retrovis mian propran rondon,
sed en koro restis akra domo.

Lumaj revoj, plenaj je la suno
ekbriletis al mi, soifanto,
kaj al ili, bela utopio,
eksoniĝis mia melodio,
mia longe ripozanta kanto.

Mondo ŝajnis al mi plej perfekta,
malaperis ĉie dolorĝemo,
kaj sur juna, nova, bela tero
paŝis homoj plenaj je espero,
ornamitaj per la diademo.

Ho vi revoj, miaj belaj revoj,
kial vi disfluis en aero?
Mi ja vin nur delikate tuŝis
kaj subite vi sur tero kuŝis,
sur reala kaj sur kota tero.

Nun mi sidas ree ĉe la forno
en la mezo de la familio,
kaj el mia vundtuŝita koro
malaperis ankaŭ la memoro
pri vi, revoj, bela utopio.

12./XI.

Fino.

KION LA VIVO ALPORTIS.

**DEK ORIGINALAJ POEMOJ DE D.RO STANISLAV SCHULHOF,
EN PARDUBICE (BOHEMUJO).**

KUN ANTAŬPAROLO DE MARIE HANKEL.

*Al la memoro de unua bohema batalanto por la
ideo de arta lingvo internacia, glora poeto,
filozofo kaj pedagogo en dek sepa jarcento, J.
AMOS KOMENSKY, dediĉas aŭtoro*

MOTO: ...Kiu estas tiu,
kies doloro tiel laŭte sonas
kaj kies krio flugas ĝis la steloj
kaj volas en terur' ilin haltigi?
Jen estas mi...
(El "Hamleto" de SHAKESPEARE -
L. L. ZAMENHOF.)

ANTAŬPAROLO.

En nia mondo, aŭ pli ĝuste, sur nia tero nur tre malofte okazas io nova, tion certigas kaj jesigas kapbalancante saĝegaj maljunuloj en ĉiuj epokoj. Sed se iafoje tamen io nova ekaperas sur nia astro, tiam la surprizo estas senlima. Oni dubas, nekredas, malaprobos kaj mallaŭdas plengorĝe. "Tia novaĵo ja neniam ekzistis, tial ĝi ne povas esti, vivi, prosperi kaj sukcesi."

Sed kelkaj, malmultaj riskemuloj ekvidas antaŭ siaj larĝe malfermitaj okuloj grandan, belan perspektivon, ili sentas kapturnon, la sango rapide kuras en la vejnoj, la koro laŭte batas - granda emocio ilin kaptas. Ili ne timas la danĝeron de la novaĵo, kuraĝe ili sin profundigas en la nekonatan vastaĵon.

Emocio fariĝas entuziasmo, entuziasmo naskas infanon: la poezion. Granda epoko sen poezio ne estas imaginebla [tiel].

Nia esperantista movado estas granda epoko, ĝi estas unu el la maloftaj, novaj okazintaĵoj de nia homa evolucio. Tial, ekaperinte, ĝi vekis poezion. Ĝia genia elpensinto esprimis sian grandan emociion per versaĵo; kiu Esperantisto ne konas kaj ne simpatias kun la ekĝemo: "Ho, mia kor'?" Ses modelajn ekzemplojn Dro Zamenhof aldonis al sia "Plena lernolibro" de 1887. Nur unu el ili, la letero, estas prozaĵo, la kvin

aliaj havas altan stilon, riman kaj senriman. Sen beleco lingvo ne povas vivi, sen floro ne fariĝas frukto.

La homo ne nur bezonas prozon, li ankaŭ bezonas poezion. Poezio estas la forta flugilo, kiu alkondukos nian Esperanton al la venko.

Marie Hankel.

J. A. COMENIUS.*

Al fervora nederlanda samideano J. L. BRUIJN.

MOTO: Venos tempo, en kiu aro da bonaj homoj Vin ŝatos Komenio, eĉ farojn, eĉ esperojn Viajn, eĉ ankaŭ dezirojn.
G. W. Leibnitz 1671

Ĉu Vi konas malgrandetan urbon,
kiu ĉe Vi, ie en la Nordo
kuŝas dolĉe ĉe la mara bordo?
Naarden estas ĝia simpla nomo
kaj en tombo tie sub la tero
sonĝas dolĉan sonĝon sen sufero
sanktaj restoj de l'plej bona homo.

Se Vi konas urbon tiun Vian
kaj Vi tien venos per okazo,
mi, Sinjor', Vin petas kun emfazo,
lin vizitu en libera horo.
Por la samaj celoj idealaj,
kiujn ni nun sekvas, plej kristalaj,
batis ankaŭ lia bona koro.

Kiel Vi kaj mi, li ankaŭ sonĝis
en la verkoj belaj sen komparo
pri la unueco de l'homaro,
pri eterna kaj senĉesa paco;
sed al li kaj lia flama vorto
malfavora estis viv' kaj sorto,
- sur la tero mankis por li spaco.

Sed li fine trovis la trankvilon
kaj kun sia sonĝo ĉarma, granda,
en malgranda urbo nederlanda
dormas tiu nia antaŭulo
kaj sur lia tombo, jam sen larmo,

kantas nune nur la birda svarmo
kaj ekfloras simpla konvolvulo.

Se Vi tien venos, mi Vin petas,
diru al li, ke en lia lando
estas nune viva propagando
por la sonĝo lia filozofa,
ke en kor' de multa jam Bohemo
gaje kreskas lia bona semo
en la form' de lingvo Zamenhofa.

Aperis 1./IV. 1911 en "De Avondpost"
en 's-Gravenhage (Nederlando).

* *Elparolu: Komenius.*

φ

MANIO PLIBONIGOZA AKUTA.
(LAT.)

MOTO:Tiam en la kapon
kuraĝa pens' al mi subite venis...
(El "Hamleto".)

Ne povinte lastan nokton
eĉ nur unu horon dormi,
mi pripensis, ĉu mi povus
nian lingvon trareformi.

Anstataŭi la finiĝojn
kaj aldoni novan kazon
kaj starigi nian lingvon
tute sur logikan bazon.

Speciale la finiĝojn
aĵo, umo, emo, igo,
oni devus jam forĵeti,
por la lingva plibonigo.

Kiam mi pri lingvo pensis
kaj pri ĝia fundamento,
naskiĝis en mi ideo
pri problema homa gento.

Nia gento estas vere
fuŝfarita ĉe la fondo
kaj li, kiu ĝin bonigus,
estus fama en la mondo.

Oni povas tion diri
tute sen la embaraso,
el kreaĵoj, ke la homo
plej malbona estas raso.

Mi proponos, tuj mi pensis,
ŝanĝi tiun homan staton
kaj por tiu celo krei
ian homan komitaton.

Kaj ĉi tiu komitato
devus trovi fundamenton
kaj ni laŭ ĝi plibonigos
la fuŝitan homan genton.

Sed se tiu komitato
tre prokrastus la decidon,
mi mem kreos novan homon,
reformitan homan - idon.

Aperis en Bohema Revuo Esperantista
en novembro 1910.

φ

SUR NOVA VOJO.

*Al mia juna franca amiko, sinjoro J. BORDES
en SAINT CHAMOND.*

MOTO: Aferojn kaj dezirojn ĉiuj havas -
mi ankaŭ, la mizera, iros fari
aferon mian...
(El "Hamleto".)

Ĵus mi rememoras tiun tempon,
kiam mi ekaŭdis antaŭ jaroj,

ke en mondo ie iu homo
lingvon ian novan publikigis,
kaj ke tiu stranga idiomato
alkondukos homojn trans la baroj,
kiujn la miljaroj amasigis.

Senpripensa tiam mi rimarkis
la aferon sole unu fojon,
sed ne multe tion komprenante
mi forpelis ĝin el la memoro,
ne ankoraŭ tiam divenante,
ke mi iam sekvos saman vojon
kaj ke sangos por ĝi mia koro.

Tiam ankaŭ mi apenaŭ sciis,
ke alvenos noktoj sen la dormo
kaj la tagoj plenaj je la nubo,
plenaj je doloro kaj sen fido,
ke esperon sekvos ĉiam dubo
kaj ĥimeroj de plej stranga formo
ke min persekutos kun ekrido.

Do mi ne bedaŭras tiun ŝanĝon.
Iru nur aliaj sur la vojo
glata, bela, simpla, oportuna!
Min allogas ĉiam nur la baro,
kiu staras antaŭ mondo suna
kaj sur tiu baro kun la ĝojo
mi batalos gaje por idaro.

Aperis en Bohema Revuo Esperantista
en februaro 1911.

φ

RESPONDO AL SINJORINO MAR. HANKEL.

MOTO: Feliĉe la vorto "Despero" ne
ekzistas.
(El privata letero de M. HANKEL.)

Viajn belajn vortojn pri la mondo,
pri la vivo, nia malforteco,
pri la fina venko de la amo,
pri la fino de la homa dramo,
mi ne povas lasi sen respondo.

Nun mi estas ankaŭ konvinkita,
ke feliĉo, kiun homoj serĉas
en la sferoj tute sen la nomo,
loĝas en la kor' de ĉiu homo,
kiel ia ĝermo parazita.

Oni devas nur ĝin lasi ĝermi,
ne timigi ĝin kaj ne forpeli;
ĝi ja estas delikata semo
kaj precipe kontraŭ dolorĝemo
oni devas forte koron fermi.

Ho, mi pensas, ke en mia koro
dormas ankaŭ iom da feliĉo,
ke la ĝermo estas tute viva,
ke doloro estis nur fiktiva
kaj senbaza ĉiu mia ploro.

Mi promesas al Vi, Sinjorino,
ke mi flegos tiun mian semon,
ke mi pereigos tiun vermon,
mordaĉantan delikatan ĝermon
ĝis al tuta ĝia elimino.

Mi promesas ankaŭ sen fanfaro,
ke en tuta mia posta vivo
mi la vorton "Desper" ne eldiros
kaj neniam ankaŭ mi deziros,
ke la vort' paradu en vortaro.

12./I. 1911.

φ

AL VI, LINGVO MIA.

MOTO: Vi, mia tuta vivo kaj trezoro!
(El: "Hamleto".)

Al Vi, lingvo mia, mia Esperanto,
kiu en la tagoj plenaj jam je prozo
ravis koron mian, kaj per sun' kaj rozo
ĝin plenigis ĝis al superfluo,
al Vi, lingvo mia, mia Esperanto,
sonu ree mia hodiaŭa kanto.

En malhelaj tagoj, preskaŭ en aŭtuno,
LA DUA JARCENTO
de Esperanto

de la vivo mia la plej bela peco,
mia longe forgesita infaneco
sin enŝtelis kun Vi en la koron
kaj ankoraŭ unufoje en aŭtuno
ekridetis je mi ree varma suno.

Ĉarmaj virinetoj de l' profunda maro,
Karol Moor kaj Hamlet, stranga princo
dana,
granda Guliver' kun gento filigrana,
cikonio kun infan' en beko;
preskaŭ ĉiujn mirojn de la ter' kaj maro
mi ekvidis per Vi, belajn en komparo.

De la vivo mia forgesita paĝo
malfermiĝis per Vi, lingvo mia kara,
kaj en vivo mia nuna, ordinara,
Vi permesis al mi, lingvo mia,
legi ree ion sur malnova paĝo
pri pli belaj jaroj, mia juna aĝo.

Se mi estas iam al Vi malpli varma,
pro la efemera bildo de l' juneco,
pro malgranda de l' feliĉo peco.
kiu per Vi al mi ekaperis,
ĉiam por Vi batos mia koro varma,
por Vi, lingvo mia, lingvo mia ĉarma.

3./II. 1911.

φ

FOJE EN KONFUZA HORO.

MOTO: Ekzistas ja fonto, se oni trin-
kas el ĝia akvo, ĉiu estintaĵo malaperas
el la memoro. Kiu al mi montrus la vojon
al la fonto?
(El "Akvo de l' forgeso"
de RD: BAUMBACH-M. HANKEL.)

Se mi sciis, kie en la vasta mondo
mi vin trovi povus, akvo de l' forgeso!
Tuj mi al vi irus trans plej krutaj baroj,
trans plej fremdaj landoj, trans plej ruzaj
maroj,
ankaŭ se vi estus ie en Hadeso.

Amo plej terura koron mian premas,
amo sen espero, amo sen sukceso,
sen la ĉirkaŭprenoj kaj sen rekompenco,
amo al fantom' sen korpo kaj esenco - -
Kie vi nur estas akvo de l' forgeso?

Se virin' ĝi estus kun la roz' sur vango
kaj kun sango en la vejnoj cirkulanta,
ho, mi premus ŝin al mia seka brusto
kaj sur ŝia blanka, delogema busto
trankviliĝus mia koro soifanta.

Se patrin' ĝi estus, kies flamajn kisojn
mi ankoraŭ sentas sur la buŝ' kaj vango,
en la tombon ŝian mi tuj volus iri
kaj al ŝiaj teraj restoj ĉion diri,
por ke ĉesu ardi mia kor' kaj sango.

Ho ve, malfeliĉa estas mia amo - -!
Al homaro, al fantomo nereala
vane mi la brakojn miajn nun etendas,
vane mi la kisojn al ĝi ardajn sendas,
vana estas mia lingvo neŭtrala.

Vane en la brusto vibras mia koro,
malbenita am' al vorto sen enhavo!
Kantojn miajn ĝi ja tute ne komprenas,
vane en la revoj mi ĝin ĉirkaŭprenas,
strangan homan aron kun la sang' sur
glavo.

Ve al homoj, kiuj en flamemaj koroj
portas tiun amon vanan sen la ŝanco!
Homaj restoj putras en la Manĝurio,
sang' ankoraŭ fluas sur la Kalvario
kaj la flam' ne ĉesis fumi en Konstanco.

Se mi scius, kie en la vasta mondo
mi vin trovi povus, akvo de l' forgeso!
Tuj mi al vi irus trans plej krutaj baroj,
trans plej fremdaj landoj, trans plej ruzaj
maroj,
ankaŭ se vi estus ie en Hadeso.

26./III. 1911.

φ

VINTRA KANTO.

MOTO: - dume vivu, sed al la morto
vi jam apartenas. (El *Hamleto*.)

Kia estas sorto malfavora,
ke mi ne renkontis vin en tiu tago,
kiam tra la vejnoj fluis varma sango,
kiam rozoj floris sur la juna vango
kaj la kor' sopiris je la sun' kaj ago.

Kiel sonus tiam mia kanto,
kiam vivoplena estis ĉiu membro
kaj ankoraŭ brulis en la kor' la flamo!
Malfavora estas vintra tag' por l' amo
kaj la rozoj ne ekfloras en decembro.

Nur la neĝo falas dum la vintro
kaj senvive staras arboj en ĝardeno;
dormas sur la tero ĉiu organismo,
korpon turmentegas nokte reŭmatismo
kaj malvarma estas nia ĉirkaŭpreno.

Nur malgajajn oni melodiojn
kantas, se la branĉoj estas sen la suko,
se ĉielon kovras nubo densa, griza,
se jam ĉesas bati koro paraliza,
kaj sur tero kuŝas blanka mortotuko.

Aperis en Bohema Revuo Esperantisto
en junio 1911.

φ

PRINTEMPA KANTO.

*Al mia unua amiko en fremdlando sinjoro
KAROL NIEWEGLOWSKI, en Vilno.*

MOTO: Vi scias ja: la leĝoj de l' naturo
ne estas refareblaj! Kio vivas,
necese devas iam morti.
(El *"Hamleto"*.)

Sur vojeto sabla foje en printempo
mi senvivan alaŭdeton trovis.
Jam malpura estis la plumaro

kaj sur korpo ĝia granda aro
da insektoj svarmis kaj sin movis.
Ĉarman infaneton de l' aero
manĝis mutaj vermoj de la tero.

Antaŭ tago eble ĝia gaja kanto
en aero hela laŭte sonis
kaj plej nobla himno de l' naturo
sur la teron fluis el azuro,
dume ĉio en la suno dronis,
en la suno dronis hela, varma.
Kiel estas nia mondo ĉarma!

Se vi vagas iam sola en printempo,
en printempo, kiam ĝermas ĉio,
tiam vin kuŝigu sur la musko.
En orelon vian el krepusko
enpenetros stranga melodio.
Ankaŭ el profundo de la tero
vi ĉkaŭdos kanton pri espero.

Vi ĉkaŭdos kiel el gravedaj semoj
junaj ĝermoj kreskas tra la humo,
kiel gutoj plaŭdas inter eroj,
kiel ĉio zumas en la sferoj,
kie regas ĉiam nur mallumo.
Vivi! Vivi! krias ĉiu ĝermo,
ankaŭ la subtera muta vermo.

1./IV. 1911.

φ

LASTA ROZO.

*Al Ŝia Princina Moŝto HELENI EM. KOPASSIS,
Princino de Samos.*

Rozon en malfrua temp' aŭtuna
mi en parko solan foje trovis,
sur ĉielo pendis nuboj bruna
kaj malvarma vent' senĉese blovis.
En la tempo de l' ripozo
lasta rozo.

Vojon kovris folietoj flavaj
kaj sur sekaj branĉoj eksilentis

LA DUA JARCENTO
de Esperanto

de l' birdetoj etaj kantoj ravaj.
Ĉu vi sorton vian antaŭsentis
en la tempo de l' ripozo
lasta rozo?

Stranga estas ofte la naturo!
En la koro velka kaj sen flamo,
sur arbeto seka sen kulturo
sen atendo kreskas flor' kaj amo;
en la tempo de l' ripozo
lasta rozo.

Ho ve floroj, kiuj en aŭtuno
kreskas, kiam dormi vi jam devas!
Kia floro estas sen la suno?
Kia am' en koro, kiu krevas?
En la tempo de l' ripozo
lasta rozo.

Aperis en Greklingva Esperantisto
en junio 1911.

φ

FINALO.

MOTO: Elrigardadis, kiel se gutoj da sango
ŝprucus supren el la akvo
(El "La virineto de maro"
de ANDERSEN-ZAMENHOF.)

Nur momenton inter vi mi estis,
nur momenton sonis mia kanto,
ree vokas vivo ordinara,
vivo al mi ĉiam plej avara,
malfeliĉa sort' de l' pilgrimanto.

Al aliaj mi la vojon lasas,
kie mi nur paŝis per hazardo.
En la mondo nova, ideala,
devas soni nur kant' najtingala,
gaja kant' de l' pli feliĉa bardo.

Nur antaŭen devas mondo flugi,
ĉiam supren, supren, for de l' tero,
kaj al tiu mondo hela, nuna,
apartenas nur la kanto suna,
kant' sen dubo kaj sen malespero.

Kies koro sangas ekvundita,
tiu nur sin kaŝu en la domo;
ne al homoj, kiuj ploras, svenas,
al fortuloj mondo apartenas,
nur al sana, forta superhomo!

Oni diras, ke la dioj ankaŭ

kontraŭ sia sorto ne batalas
Simpla, ĉiutaga bagatelo -!
en la maro dronas unu stelo -
Fino! Fino! - -
- - La kurteno falas.

4./IV. 1911.

φ

AŬTUNAJ FLOROJ.

DEK ORIGINALAJ POEMOJ DE DRO STANISLAV SCHULHOF EN PARDUBICE (BOHEMUJO).

AL MAJSTRO

DRO L. L. ZAMENHOF,

AŬTORO DE ESPERANTO

DEDIĈAS RESPEKTPLENE KAJ SINCERE

LA AŬTORO.

MOTO: Kiom de mi en silento

al vi iris jam oferoj;

El: "Mia Penso" de

Dro L. L. Zamenhof.

ANTAŬPAROLO.

Sur Parnason mi foje suriri intencis, sed la Parnaso estis jam plena; pri laŭroj mi foje sonĝis, sed anstataŭ laŭroj mi trovis nur dornojn; en korojn mi enpenetri foje penis, sed la koroj estis fermitaj.

Kaj tamen atakon mian mi ripetas, simile al niaj unuaj batalantoj, kiujn neniam malsukceso kaj doloro senkuraĝigis. Ĝi estas eble la sorto de ĉiuj, kiuj laboras por la venontaj tempoj kaj homoj.

Kun ĉi tiuj maltrankvilaj pensoj mi sendas ĉi tiun mian trian modestan verketon en la vastan mondon.

En aŭtuno de jaro 1912.

Dro Stanislav Schulhof.

KIAL VI MIN VEKAS EL LA DORMO?

Al sinjoro STANISLAW KAROLCZYK (Eska).

Mi profunde kaj kviete jam ekdormis,
tute sen la sonĝoj kaj sen intereso,
ĝi, mi kiun tiel longe serĉis, vokis,

la fabela, sorĉa akvo de l'forĝeso
ĉiujn miajn pensojn preskaŭ jam sufokis.

Mi similis kvazaŭ jam al somnambulo,
senkonscie spiris, kiel malsanulo
en dolĉeta atmosfer' de kloroformo -
Kial vi min vekis el la dormo?

Nun mi ree vivas! Hela estas tago,
plena estas la aero de la kantoj;
homoj venas, iras, vundojn miajn tuŝas
kaj severe, kiel iaj kritikantoj
provas sangon, kiu sur la vundoj kuŝas.
Ho, doktoroj, nur ĝin provu kun kuraĝo!
Ĝi ja estas vera kora fluidaĵo,
tute Fundamenta kaj laŭ leĝa formo -
Kial vi min vekis el la dormo?

Ĝis la*) lasta tago mi deziris dormi,
nur profunde dormi, eĉ sen rememoro;
mi estingi volis ĉiun mian amon
kaj mi preskaŭ jam sukcesis en la koro
kvietigi mian brulevarman flamon.

Jen, Sinjor', vi strange antaŭ mi ekstaris!
Ho, respondu, kion mi nur al vi faris,
ke vi, nekonata, tute sen informo
min subite vekas el la dormo?

13./I. 1912.

φ

SOVAĜA KANTO.

Al sinjoro STANISLAW BRAŬN (Wiktor Elski).

Foje en aŭtuno, kiam birda aro
sin pretigis flugi ien trans la maro,
kiam en la parko velkis lasta flor',
tiam ankaŭ mia kanto bela, juna
eksopiris je la lando varma, suna
kaj kun birda svarmo flugis de mi for.

La printempo venis en sekvinta jaro
kaj de sud' kun birda petolema aro
venis ankaŭ mia forfluginta kant';
mi ĝin kompreneble logis, kapti penis,
sed la sovaĝulo min jam ne komprenis
kaj sin al mi kaŝis ie en lekant'.

Tial, se vi kanton mian koni volas,
serĉu en natur' ĝin, kie vivo bolas,
sed ne en la libroj, ie sur paper';
inter papilioj, muŝoj, floroj ĉarmaj,
sur herbejo verda, en radioj varmaj

LA DUA JARCENTO
de Esperanto

mia kant' petolas ie sur la ter'.

Mi ne scias, kie vi ĝin serĉi devas,
kie ĝi sin kaŝas, kie nune revas,
aŭ ĉu je vi ridas ie el sekret';
eble ĝi fariĝis bonodora floro
kaj ĵus hejmen portas ĝin sur juna koro
ia sopiranta, bela knabinet'.

11./III. 1912.

Aperis en Pola Esperantisto.

En polan lingvon tradukis Czeslaw Kozlowski.

φ

RECEPTO POR FARI BONAĴN VERSAĴOJN.

Vi do volus scii, kiamaniere
oni lernas skribi versojn esperantajn?
Kiel rimojn trovi, kiel belan senton,
kiel lerni ĝuste uzi la akcenton
por versaĵojn fari ĉarmajn, elegantajn?

Nu mi al vi, kara, kun plezur' respondos
kaj fidindan donos al vi eĉ recepton,
kiamaniere kaj sen embaraso
vi rapide lernos rajdi sur Pegaso
kaj en redakcioj trovos bonakcepton.

Vi unue devos studi la libreton
pri la versfarado kaj pri la rimaro,
kaj por ke vi agu ĝuste kaj laŭ plano
vi aĉetos al vi veston el ŝaflano,
por vin bone ŝirmi kontraŭ nazkataro.

Vi ja scias certe, ke dum la printempo
oni la plej ofte faras versojn ĉarmajn,
ke printempe tiklas la plej multe plumo,
sed ke nin minacas ankaŭ malvarmumo,
tial mi eĉ ŝuojn rekomendas varmajn.

Kiam la libreton vi trastudas, nune
iru en naturon, eble en arbaron,
se nur eble iru tien post krepusko

*) En la originalo estas "al", sed versaĵne ĝi estas
nura preseraro por "la".

kaj sidigu tie vin sur ŝton' aŭ musko
kaj tralegu ree bone la rimaron.

Vi ekvidos certe flugi la birdetojn
kaj en musko ankaŭ kreski junan floron,
ĉarman lekanteton, eble eĉ galanton,
kaj de arboj aŭdos vi nun dolĉan kanton,
kiu ĝojoplena faros vian koron.

Bone eĉ memoru, ke sen sun' kaj steloj
estas poezio preskaŭ nelegebla,
sed samtempe skribi pri belega luno,
pri brilantaj steloj kaj pri varma suno
eĉ en Esperanto estas aĵ' ne ebla.

Bone estas ankaŭ, se en la arbaro,
kiun vi elserĉos, plendos najtingaloj
kaj se rivereto plaudos en proksimo,
tiam ne komponi estus vere krimo
kontraŭ ĉiuj homoj, kontraŭ la ĵurnaloj.

Sed plej bone estas, se vi kun knabino
brak' ĉe brako ie en arbaro vagos;
ĝi instigas ĉiam en plej alta grado
al la poezio kaj al versfarado,
kion la gazetoj al vi bone pagos.

16./III. 1912.

Aperis en Lingvo Internacia.

φ

KANTO DE L'SKLAVO.

Nun mi hele vidas, ke la sorto mia
estas alligita al vi per kateno,
ke mi nune ĉiam kun vi devos iri,
ke mi certe ne sukcesos jam akiri
liberecon, mia nova suvereno!

Multefoje mi forĵetis mian plumon,
eĉ emblemon vian, stelon kvinradian,
en la koro fajron mi estingi penis,
sed vi senkompatе ĉiam min ekprenis
kaj min pluen, pluen trenis, sklavon vian.

Al vi apartenas nune vivo mia,
ĉio, kion jaroj lasis en la koro;
vin mi nune sekvas kiel somnambulo,
tute kontraŭvole, tute sen postulo
kaj mi jam ne revas eĉ pri laŭr' kaj gloro.

Kie vi nur prenis tiun sorĉan forton?
Vi tra landoj marŝas sen la sang' sur glavoj,
sen kanonoj, nur kun via verda stelo,
kaj vin malgraŭ tio sekvas sen ribelo
ĉiam novaj, blinde obeemaj sklavoj.

Pli kruelan, ol la famaj uzurpantoj
vi alportis al ni en la mondon moron;
ili piedbatis homajn liberecojn,
de la landoj ŝiris partojn, limojn, pecojn,
sed vi ŝiras el la brustoj nian koron.

8./VII. 1911.

Aperis en La Marto.

φ

KANTO PRI ESPERO.

Ĉu vi aŭdis jam pri la evangelio,
kiu en la form' de juna, verda stelo
brilas hele al homaro sur ĉielo?
Ĉu vi aŭdis jam pri unu familio,
kiu nun formiĝas gaje en homaro
malgraŭ la landaj limoj, malgraŭ vasta
maro?

Ho, vi certe aŭdis, sed vi sen konfido
ekrigardas al ĉielo, kie Dio
reaperas al ni verda en radio.
Al la tero celas via laca vido
kaj la strangajn aĵojn en la nuboj
vi renkontas nune nur kun rid' kaj duboj.

Kiu vin kondamnu, teraj kreitaĵoj!
Humo estas via propra baz' kaj sfero,
ĉiutagan panon donas al vi tero,
ĝi ja estas font' de l'viv' kaj ĉiuj aĵoj,
dume la ĉiel' vin ofte, ofte trompis,
kaj evangliojn siajn krude rompis.

Dio mem, laŭ Sankta Skribo, foje venis
sur la teron, ĉarma, nobla kun devizo,
ke sur tero iĝu nova paradizo,
sed sur Kalvario morto lin ekprenis,
kaj je lia nomo, kaj pro lia amo
plena estis poste mond' je larm' kaj flamo.

Preskaŭ du mil jarojn poste sur Sekvanto
ree Dio ekaperis al homaro,
nova Dio, ree granda kun fanfaro,
homajn rajtojn portis li en unu mano,
sed en dua li alportis malesperon
kaj cent mil da tomboj kovris francan teron.

Tamen sen Espero, kia estus vivo?
Eĉ se nin forlasas niaj belaj revoj,
eĉ se nin ekridas, kiel maraj mevoj
kaj en rub' disfalas ĉiu perspektivo,
vivo sen Espero estus sen risorto,
senenhava vivo, animala sorto.

Tial brilu al ni steloj sur ĉielo!
Brilu, brilu, eĉ se via ĉarma brilo
estas sen substanco, tute sen utilo
kaj neatingeble dezirata celo!
La infero estus nia viv' sur tero,
se ĝin ne dolĉigus iam la Espero.

19./VII. 1911.

Aperis en Bohema Revuo Esperantista 1911.

φ

FRANCESCO PETRARCA.

Al vi, eminenta majstro de l'soneto
mi dediĉas tiun simplan kanton mian
kaj de poezio formon plej gracie
mi elektis por ĝi, simpla poeteto.

Nur malhele, kiel en la silueto
mi vin vidas, majstro mia, amebrian,
vian ĉarman Laŭron, ĉastan, abstemian,
nokte deziranta ie en sekreto.

Flame vi sopiris je la kor' de Laŭro,
sed la ĉarma al vi ĉiam malaperis,

kiam vi ŝin tuŝi provis delikate;

tute same, majstro, al mi senkompate
kiam certe ĝin jam teni mi esperis,
glitis for el miaj manoj verda laŭro.

29./VI. 1911.

φ

FUNEBRA KANTO AL LA MEMORO DE GRAFO L. N. TOLSTOJ.

De sensignifa rusa Āstapovo*)
trans land' kaj maro flugas stranga movo.
Li, kiu tiom amis mondon tutan,
ĵus finis vojon sian, grandan, krutan.

Ne sonos en preĝejoj sonoriloj,
nur homaj koroj ploros, centoj, miloj,
kaj oni sen kantado kaj sen preĝo
en tombon metos lin laŭ pastra leĝo.

La simplan ĉerkon sekvos granda aro
kaj ploro korŝiranta nun sen baro
ĉielen flugos el la kor' de l'gento,
al kiu apartenis lia sento.

Sed via ploro estos nur blasfemo.
Lin gardos eklezia anatemo
Kaj de la tombo vin kun viaj larmoj
forpelos poste eble la ĝendarmoj.

Ho, povas plori vi popolo muta,
en hejmo lia kaj en mondo tuta
sur tomb' de homo nobla, granda, ĉasta,
de rusaj landoj ĝis al maro vasta.

Ho, multfoje en la historio
similan stelon eklumigis Dio;
ĝi brilis nokte kiel la juvelo,
sed ĉiam malaperis de ĉielo,

Kaj ĉiam la fabelo sin ripetis.
Vi ree ŝarĝon vian trenis, ĵetis

*) Tolstoj mortis en Astapovo.

Nia literaturo

kaj atendadis ree sen murmuro
ĉu nova stel' aperas en lazuro.

6./VII. 1912.

Bohema originalo de la samo aŭtoro
aperis en "Osveta Lidu" 22./XI. 1910.

φ

AL LA MEMORO DE W. T. STEAD.

MOTO: Nearer my God to thee...

Tutan mondon skuas unu granda ĝemo
de la oriento ĝis al okcident',
plej funebra sonas ĉie rekviemo
kaj la korojn premas unu sola sent'
pro vi, kiuj laŭ mistera dia plano
kuŝas en la profundaĵ' de l'oceano.

La plej granda, nobla verko de l'homaro
kun vi ekbatalis, granda, ho, natur',
kun vi de sekretoj plena, vasta maro,
kun vi stranga elemento sen mezur'!

Tamen, ve, ne estas homa fort' sen
limoj,

kaj sur fundon maran falas la viktimoj.

Unu kunpuŝiĝo kaj ... finiĝas ĉio!
Mastoj tuj falegas, staras la radar',
kaj la koron disŝiranta plor' kaj krio
disvastiĝas en mallumo sur la mar'.
Homa verko ŝanceliĝas kiel ŝelo
kaj en ondoj dronas ankaŭ Verda Stelo.

Ho, ai multa hom' en hor' terura, sorta
lasta rifuĝejo estis vi, Esper',
antaŭ ol lin mara ondo, ŝaŭma, forta
portis for en strangan mondon sen mizer'.

Ho, Espero, via plej fervora ano
ankaŭ dormas nun sur fund' de l'oceano.

Kaj la maro ree ondojn siajn rulas
sur profunda tomb' sen krucoj kaj sen nom',
frosta vent' de nord' per sia kanto lulas
ilin en plej nobla tombo de la hom':

"En nemezureble, nekonata spaco,

dormu, dolĉe dormu en eterna paco."

20./IV. 1912.

Aperis en "The British Esperantist", 1912.

φ

LETERO AL AMIKO ESKA.

Reminiscenco pri Krakow.

Fine mi ĝin trovis, kanton mian belan,
kanton kiun vane serĉis mi en kor'.
Ĝi infano estas mia efektiva,
part' de koro mia, varma, juna, viva,
sur herbej' aŭtuna elkreskinta flor'.

Ho, mi ĝin rekonas, mi eĉ horon scias,
kiu sonis tiam nokte sur horloĝ';
sur benketo sidis ni en Plantacio
kaj kun kor' krevanta kaj kun emocio
pri hejm' via ni parolis, via Lódź.

Homoj preteriris, noktaj geamantoj,
brako ĉe la brako, koro ĉe la kor';
en iliaj vejnoj ruĝa sango bolis,
siajn esperetojn ĉiuj priparolis -
ho, benata estu, vi, meznokta hor'!

Tiam koron mian mi al vi malfermis,
kiel se vi estus mia amatin',
kaj dum ni parolis unu kun alia
nova kant' ekĝermis en interno mia,
sed survoje hejmen mi, ho, - - perdis ĝin.

Tage, nokte mi ĝin serĉis, tamen vane,
ĉiuj ĝiaj postesignoj estis for.
Eble, pensis mi, ĝin vento supersŭtis,
eble ĝin por ĉiam terintern' englutis,
mi ĝin de tiama ne ekvidis hor'.

Kia stranga vere estas ĝi hazardo,
ke ĵus vi ĝin trovis ie sur la voj'!
Kvankam vi alian al ĝi formon donis,
tamen mi la kanton mian tuj rekonis -
dankon al vi pro farita al mi ĝoj'.

20./VIII. 1912.

RIMARKO: Plantacioj estas parko sur la loko de iamaj muroj kaj remparoj, kiuj ĉirkaŭadis en mezepoko la urbon Krakow.

φ

VI FELIĈAJ HOMOJ ĈIUTAGAJ!

Vi feliĉaj homoj ĉiutagaj!
Malrapide, lace vivo via fluas,
ondoj vin ne ĝenas, ventoj vin ne skuas
kaj regule pulsas via kor',
ĉe la forn' vi sidas, kie brulas ŝtipoj,
dume sur la maro ĝemas mia ŝipo
kaj la vent' min pelas for kaj for.

Vi feliĉaj homoj ĉiutagaj
tamen sekvi vivon vian mi ne volas.
Je senlimaj landoj sango mia bolas,
je la viv' sen brido, sen katen';
je la amo al la nuna nesimila
nur sopiras mia koro maltrankvila,

maltrankvila kor' de Beduen'.
Vi feliĉaj homoj ĉiutagaj!
Kiu el vi konas koron de l'poeto?
Strangaj emocioj, nokta malkvieto
estas lia efektiva sort'.
Pro dubinda peco de fiktiva gloro,
pro vort' via unu brulas lia koro
kaj la vivo pasas sen komfort'.

Vi feliĉaj homoj ĉiutagaj!
Malproksime de vi siblas, krakas ŝipo,
dume vi ĉe forno, kie brulas ŝtipoj
sidas dolĉe en vespera hor'.
Ĉu vi scias, ke en libro, kiun tenis
vi en manoj, kaj ĝin eble ne komprenis,
konvulsie ĝemas homa kor'?

29./III. 1912.

Fino.

BOHEMAJ GRENATOJ

POEMARO DE DRO STANISLAV SCHULHOF

Mi estas*) certe sukcesinta trovi kaj eĉ tradukinta multe pli gravajn kaj eble multe pli belajn poemaĵojn en nia riĉa nacia literaturo, sed diversaj cirkonstancoj kaŭzis, ke mi devis limigi mian originan intencon.

Tamen eble eĉ el ĉi-tiu malgranda kolekto estos videble, ke en nia patrujo naskiĝas poetoj, kiuj meritas, ke la vasta mondo ilin ne malpli konu, ol ĝi konas niajn ruĝe brilajn bohemajn grenatojn.

Dro Stan. Schulhof

Jaroslav Vrchlický:

LA KANTO.

Vi ĉion eblan al mi donis, mia Di',
la ĉarmon de junec' kaj dolĉan poezion,

*) en la originalo: *estas*

TIUN-ĈI POEMARON DEDIĈAS AL LA
TUTA ESPERANTISTARO JE MEMORO DE
SIA EDZO

SINO HERMINA SCHULHOF(OVÁ)

dolorojn de la viv' kun ama rapsodi',
redoni nun mi volus al vi ĉion.

Ne pro infana, senpripensa sent' kaj kor',
sed post kvieta kaj profunda konsidero,
ĉar fumo estas la feliĉo kaj la glori',
kaj nekonstanta nia am' sur tero.

Mi scias, tia estas monda organiz',
mi estas ankaŭ spik' kun sia fina fato,
sed kial sur branĉ' seka flor' de paradiz',
se ĉio morti devas sen kompato?

Mi tamen al vi, Dio, dankas, sed kun pen',
dank' mia estas ŝaŭma vino kun
veneno,
ĝi estas de amantoj lasta ĉirkaŭpren',
kis' arda de du lipoj - sen reveno.
φ

Antonín Klášterský:

DOLOROSA.

Kun infanet' malsana apud urba muro
eksidis la patrin' kaj vidis kun teruro,
la fortoj de l'ideto ŝia, kiel svenas,
spirado kiel ĉesas kaj la fino venas -
kaj de okuloj ŝiaj rulas larm' post larmo.

Jen preterpasis Kristo inter homa svarmo.
Ŝi al li manojn levis kun sincera peto:
"Sinjoro, proksimiĝu, helpu al ideto,
ĝi, vidu, mortas jen, kaj vi miraklojn faras."

Kaj Krist' tuj proksimiĝas kaj pensante staras.
Li vidas lignan krucon, sur ĝi sian finon,
apude dolorĝemi, plendi la patrino:
Li vidas, kiel sangas, krevas ŝia koro,
sed help' ne venas al ŝi en ĉi-tiu horo
kaj oni eĉ ridegas je doloro vana.
Li tuŝis la infanon kaj ĝi iris sana.
φ

Petr Bezruč:

MARINJO MAGDON.

Magdon maljuna el Ostrava hejmen
iris vespere kaj haltis je brando;
falas en foson kun kap' disrompita -
hejme tre ploris Marinjo Magdon.

Karbovagon' renversiĝis sur relo,
sub ĝi elspiris*) vidvino de Magdon.
Orfoj kvin ploris en Hamro Malnova,
kaj pleje plejaĝa Marinjo Magdon.

Kiu nun ilin adoptos, satigos?
Ĉu vi por ili nun estos gepatroj?
Ĉu minejestro la koron posedas,
kiel vi sama, Marinjo Magdon?

Finon ne havas markiza arbaro.
Kiam la patron mort' trovas en mino,
lignan fasketon, ĉu orf' preni povas?
Pensas vi tion, Marinjo Magdon?

Frostas, Marinjo, kaj mankas manĝaĵo.
Plena montaro de branĉoj kaj ligno.
Vidis urbestro vin, Hochfelder, ŝteli,
ĉu li silentos, Marinjo Magdon?

Kian fianĉon vi al vi elserĉis?
Plumon sur ĉap' kaj pikilon ĉe brako,
frunton severan, kaj vi kun li iras:
ĉu en Frydekon, Marinjo Magdon?

Strange vi amas lin. Kapo klinita;
viajn okulojn vi kaŝas per tuko,
kaj en ĝin fajraj enfluas larmetoj.
Kial vi ploras, Marinjo Magdon?

Burĝoj en Frydek kaj la sinjorinoj
mokus pri vi kun mieno malica;
Hochfelder vidos vin tie en ĉambro:
Kiel vi fartas, Marinjo Magdon?

*) en la originalo: ekspiris

Flanke, Marinjo, rok' staras tre kruta,
fluas apude kaj bruas rivero,
ŝaŭma, sovaĝa jen Ostravica.
Ĉu vi ĝin aŭdas, Marinjo Magdon?

Salto maldekstren kaj ĉio finiĝas.
Via hararo kaptiĝis sur roko,
sango makulis la blankajn manetojn,
Di' kun vi estu, Marinjo Magdon.

En la tombejo ĉe muroj la tomboj,
krucoj kaj floroj sur ili ne estas.
Memmortigintaj ĉi-tie nur kuŝas.
Kuŝas eĉ tie Marinjo Magdon.

φ

Jan Neruda:

INFANA BALADO.

Eldormetis la patrino,
konsternita la infano.

Ĉe piedoj ĝiaj sidas
pala Mort' kaj je ĝi ridas.
Sur la korpo la girlando,
blankaj floroj kun rubando,
kaj en ĝia mano io,
kiel ret' por papilio.
Manoj kvazaŭ bastonetoj,
frunto ĝia - vaksa flavo,
okultruoj - sen enhavo.

"Venu al mi, infaneto,
ni ekludos en sekreto,
ĉe la lumo nokta, stela,
ĉe muziko plej anĝela
ni ekdancos - paro bela."

""Ne permesas patrineto
kaj doloras la korpeto.""

"Ho, nur iru, kolombino.
La malsanon, kiu tenis
vin, mi preni de vi venis

kaj ni povos ambaŭ kune
en ĉielon flugi nune."

""Ne, ho ne, for, mi vin petas,
patrineto nur dormetas.""

"Levu vin nur, infaneto,
sendas min ja Jezuleto, [tiel]
eĉ reĝino de l'ĉielo,
vin gardanta gardanĝelo.
Vi ekvidos ĉion brili,
ĝis vi estos inter ili."

""Do ni iru, sed singarde,
patrinet' ĵus dormas harde.
Io koron ŝian premas,
jen ŝi ploras, jen ŝi ĝemas,
kaj se min en dormon lulis,
sur vang' ŝia larmoj rulis.""

φ

Otakar Březina:

MIA PATRINO.

Tra viv' malgaje, kiel pentofarantino,
patrin' iradas mia sen parfum' kaj floroj,
frukt' seka, harda estis ŝia vivdestino,
sen refreŝiĝo pasis ŝiaj tag' kaj horoj.

De malriĉeco polv vangon ŝian ŝiris,
okulojn akre tranĉis, ruĝaj de kataro,
amase kovris vojon, kie ŝi nur iris,
kaj por ŝi, jam sveninta, iĝis buduaro.

Malhelaj jaroj kuŝis nur sur spino ŝia,
pez' de klopodoj de ŝi la freŝecon prenis,
ŝi morton sian kisis en hor' agonian
kaj ŝiaj lipoj eĉ por vivo danki penis.

Revante genuadis ŝi sur preĝejplanko
en odoranta sfer' de vakso kaj incenso
kaj vortojn de konsol' ŝi kaptis nur kun danko
kaj animsavo estis ŝia sola penso.

Ho, vi, patrino mia, lum' nun mem ĝinta,
vi, elpafita sag' en mond' sen fin', senlima,
de nomo via sono estis forvibranta,
vi tamen restis por mi ĉiam tre proksima.

De morta via sango flor' mi estas pala,
por kiu la nutraĵo viaj larmoj estis,
maldolĉa sent' de lipo via senegala
heredo por la tuta vivo mia restis.

Kaj kiam la silento vibras noktomeze,
elstaras vi el tomb' kaj kun mi iras dormi,
en mia propra spir' vi spiras ritme, peze
kaj vi en mia voĉ' ploregas tiom por mi.

En miaj vejnoj fluas varm' de korpo via,
bril' el okulo via en la mian iras,
kaj flam' de via kredo strange religia
animon mian tranĉas, pikas, sange ŝiras.

Kaj kiel via ankaŭ mia voj' malgaja,
nur seka cindrogusta frukt' en riĉa
nombro,
la vivo sen koloro kaj sen suno maja,
sur ĉiu sento mia kuŝas via ombro.

φ

Karel Havlíček-Borovský:

LA TOMBO.

Mi konsilas, knaboj
al vi sen hezito,
entombigi vin ne lasu
le laŭ la rito.

Herb' sur tomb' kreskanta
estus via fino,
ĉar la herbon formanĝegus
kapro aŭ bovino.

En solecan meti
lasu vin tombeton,
kaj sur tombo igu planti

junan tilieton.

La konsilo estas,
knaboj, tute prava,
super vi printempe sonos
kant' de l'birdoj rava.

Sur tombeto via
floros la tilio
kaj sub ĝi gejunularo
ŝercos en Julio.

Kaj la floroj estas
plenaj de mielo,
kiun suĉas kaj kolektas
malgranda abelo.

Noblan havos finon
vi en form' miela,
vin en sia kafo trinkas
eĉ knabino bela.

φ

Stanislav K. Neumann:

LA TAGO.

Kiel lakto ĵus melkita
aer' estas malvarmeta, densa, ŝaŭma.
Mi bedaŭras muŝeton bluan,
kiun hazarde mi dispremias.

Birdon pafmortigi mi hodiaŭ ne povus,
per ordon' severa interrompi kanton;
kiel ŝtonblok' grandega ĝi de branĉo falus,
kaj la ter' sub ĝi barelsimile eksonus.

Kie mi kaŝus min pro tim' kaj honto?
La suno min ĉie ektrovus.
Ĝi ne dirus vorton, ĝi nur min rigardus
per sia printempa okulo. Kaj mi estus nuda.

Per kantoj birdaj plensemita estas tago,
kiel se ĉiuj steloj estus malsuprenirintaj,

kaj apud, super vi, dekstre kaj maldekstre
graciajn manojn de radioj al si reciproke
premus.

Per kantoj birdaj plensemita estas tago.
En ĉio estas ia interna premo.
Al neniŭ mi volus kaŭzi ĉagrenon.
Mi atentis ankaŭ, por ke mia ombro
ne falu sur ion kiel nubo.

φ

Švatoŭluk Ĉech:

LA FRATECO.

Ni forĵetis la pokalon
plenan de la gal' kaj pest',
sur la tero jam eksonu
de l'frateco sankta fest'.

Nur neniŭ volu havi
ĉiujn laŭ la sama form',
dum la vivo sane bolas,
ne ekzistas unu norm'.

Se nur nia koro batos
por la sama cel' kaj ag',
tiam certe nin renkontos
foje ni sub unu flag'.

Nur prudento kaj nur sento
estu nia armilar',
la envi' kaj malfavoro
apartenas al barbar'.

Kiu volas, ke ekĝermu
en la mond' de l'paco sem',
li purigu propran koron,
estu tolerema mem.

Li forĵetu la pokalon
plenan de la gal' kaj pest',
kaj sur tero laŭte sonos
de l'frateco nobla fest'.

Jan Rokyta:

LA ALFLUOJ.

Kiel vasta maro estas viv' homara,
ĝi vespere sangas, brilas dum maten',
ŝanĝoplena, kvankam ŝajne ordinara,
ondo jen alfluas, kaj forfluas jen.

Venis de vapore, kaj elektra tempo,
ondon orientan sendis okcident',
por ke el la nokto iĝu la printempo,
por ekblovu tie nova, suna vent'.

Unu post alia, ondon sekvis ondo
kaj ĝi longe daŭris, preskaŭ jarojn cent,
sed la ondoj ŝajnis ĉiam sen respondo,
kvazaŭ ilin glutus stranga orient'.

Sed alflu' revenas, nun centoble forta,
al la okcident' ruliĝas ond' post ond',
antaŭ ol sciigos vi pri ĝi, jam morta
estos pasintec' kaj juna brilos mond'.

φ

Jaroslav Vrchlický:

AMARUS.

En monaĥej' li vivis. Kiel tien
li venis, mem ne sciis. Oni nomis
Amarus lin, ĉar id' de pek' li estis.
Li estis granda, pala, pripensema,
rigardis ĉiam teren, kiel ion
sur ĝi li serĉus. Foje li dumnokte,
dum arĝentigis kradojn luno, preĝis:
Pro pentofaroj miaj kaj turmentoj,
pro mia viv' perdita, Di', mi unu
deziras de vi nur: Mort' kiam venos?
Kaj person li ankoraŭ ne trapensis,
li kiam aŭdis: Vi ekmortos nokte,
en lampon mian, kiam vi forgesos
oleon verŝi. Pasis tagoj, jaroj.
Trankvile kiel ĉiam flugis vivo;

kaj ĉiam plenigante lampon dian
li diris: vivon mian mi lumigas.
Kaj ĉe ĝi li ridetis. En printempo
li foje replenigis sian lampon.
Mallumo estis. Jen ĉe la statuo
de l' Dipatrin' li vidis du amantojn.
Spiradon sian preskaŭ li subpremias.
Preĝintajn li silente poste sekvis
el la preĝej'. Sent' stranga lin ekkaptis.
Tombejon venis li. Aĉero
plenega estis per odor' sambuka,
freŝec' aĉera lin narkotis preskaŭ,
en bosko kantis birdo, papilioj
du, kiel floroj de l' pomarb' falintaj,
flirtadis ĉirkaŭ li. Li iris pluen.
Sur unu tomb' kovrita nur per herbo,
sub amasego de l' sambuk' floranta
la par' eksidis nun. Sur brust' ŝia
kap' lia kuŝis kaj en ŝiajn buklojn
faladis floroj, per la ros' malsekaj.
Malantaŭ kantis bird' kaj petolemaj
sur ŝia har' eksidis papilioj.
Patrinon sian, kiun li ne konis,
jen rememoris li; al ŝi li dankis
por sia viv' maldolĉa, kaj la birdoj
en aromplena bosko ĉiam kantis.
Sekvintan tagon, kiam la monaĥoj
en la preĝejon venis, kanti "horojn",
eternan lampon trovis nelumanta
kaj de Amarus mankis la postsekvoj.
Sur forgesita tomb' en la tombejo,
sur tomb' de la patrin' li morte kuŝis,
vizaĝon lian kovris blankaj floroj;
li kuŝis kaj la bird' senĉese kantis.

φ

Karel Červinka:

EN PRINTEMPO.

Kun rid' afabla la printempo paŝas juna,
fenestrojn tuj malfermu, jam vekigigas ter',
tra puraj vitroj falu sur min lumo suna,
la ĉambron trafenetru blovo de l' aer'.

Kun rid' afabla iras ĝi kun verd koloro,
ĝi iras sur tapiŝon grizan de l' ĝarden',
en boskon, kie ĵus pariĝas la leporo,
ĝi iras dum stelbrilo, kaj dum frumaten'.

Herbej' rebrilas, kiel multkolora tuko,
ĝi kaŝas sin en arb' kaj en primol',
traboru nur arbŝelon - fluos sang' - la suko
en la arbaroj vekas ree la kukol'.

En mia korp' juniĝas de l' virec' la resto
kaj mi meditas nur pri nova fort' kaj flor',
ho, kiel por la brust' malvasta estas vesto,
por amo vekiginta, por batanta kor'.

φ

Antonín Sova:

UNUA KONCERTO.

En vest' eniris li solena
kaj la amaso eksilentis,
aĉeron varman li eksentis,
en ĉambro lum' - kaj odorplena.

Malsupre sub li en parfumo,
veluroj, silkoj, muselinoj,
sur seĝoj belaj sinjorinoj
en duonombro, duonlumo.

Kaj kunfandiĝas floroj, bukloj
kun ruĝaj lipoj, molaj brakoj,
sinjoraj vicoj - nigraj frakoj,
fulmantaj vitroj de binokloj.

Li levas jam la violonon,
eksonas jam vibrantaj kordoj
kaj de piano la agordoj
enfalas tuj en ĝian sonon.

Sed majstro lia - vana gloro -
de seĝ' foriras jen subite,
pri debut' sia ekscitite
li pensas nun en koridoro.

Eviti volis li la voĉojn
de l' kritikantoj kaj publiko,
de enviema estetiko,
aplaŭdojn, kriojn kaj riproĉojn.

En ĉambro, kie tonoj sonis,
revenas li kun velka koro.
Ĉu iu en ĉi tiu horo
eĉ gloron lian rememoris?

φ

Jaroslav Kvapil:

LA NEELDIREBLA.

Mil da vortoj vibras sur la lipoj
kaj en ili estas tuta mond'.
kio do okazas sub la ripoj,
por ĝi mankas vortoj kaj respond'.

Nokte ĝi vin premas - la vampiro -
kaj vi porti ĝin ne povas jam,
ĝi feliĉ' ne estas, nek sopiro,
ĝi dolor' ne estas, nek la am'.

Ĝi en arbo kaŝas sin odora,
kaj sur frunt' ĝi ardas per la kis',
kanto per ĝi tremas, floras floro,
mil da koroj pro ĝi doloris.

La malĝoj', de aĵoj en ĝi estas,
via eternec' kaj via mond',
vi ĝin sentas, sed ĝi tamen restas
sen la ĝusta vorto, sen respond'.

φ

J. S. Machar:

SEKA PSALMO.

Problema estas nia karaktero,
du strange dissonantaj tonoj, kiuj
en ĉiu paĝ' de nia historio
kaj de nacia vivo nia sonas:
nebulo rusa, franca ekscitemo.

Ĝi estas kvazaŭ sin amike premus
ĉe ni la manojn franca okcidento
kun oriento rusa reciproke
kaj en ni restus ambaŭ karakteroj -

ni eksciteme kaj rapide brulas
por multa tute iluzia belo,
por multa eĉ plej problemplena bono,
por multaj ĵus naskitaj novaj celoj
(en kiu senco ni eĉ estas majstroj),
por vico da reformoj grandaj, brilaj,
per kiuj ni tuj vesti volus globon -

sed tuj de ie falas la nebulo,
subite nin resignacio premas
kaj restas nur maldolĉa elegio,
sopiroj plendaj, vangoj dolorplenaj. -

Sed ree en nebulo eklumiĝas
kaj tuj ekĝojas, brilas kaj diboĉas
land' nia tuta...

Kaj ni tiel ĉiam
balancas de mallumo en la lumon.
Kaj tiel en ni ĉiam balancadas
la oriente-okcidentaj eroj,
de ambaŭ mankoj, sen iliaj fortoj.

- Kaj tio estas fino plej malĝoja.

LA DUA JARCENTO de Esperanto. Interkultura revuo

Eldonas:	Internacia Esperanto-Muzeo
Redaktoro:	Herbert Mayer e- poŝto: mayer@onb.ac.at kvarfoje jare
Aperas:	Internacia Esperanto-Muzeo
Redakteja adreso:	Hofburg, Michaelerkuppel A-1010 Wien
Tendenco:	Disvastigo de interkultura kompreniĝo
Jarkolekto:	4 (en 1998 ne aperis la revuo)

Esperanto Brno
G 2751-6